Kontaktu la redakcion: kunfluo@proton.me + 31 6 19 46 48 37 aŭ @kunfluo

BALTIAJ ESPERANTO TAGOJ-59 KAUNAS 2025

# Kunfluo

ĉiutaga informilo de Baltiaj Esperanto-Tagoj
BET-59 · Kaŭno, Litovio · 5–13 julio 2025

n-ro 7 hodiaŭ: 19 °C morgaŭ: 22 °C vendredo, la 11-a de julio 2025

## RAPORTOJ

### SUS-sesio fermita kun 25 ekzameniĝantoj

Jam la trian fojon Scienca Universitata Sesio (SUS) de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) okazas kadre de BET. Ĉi-foje kun du plurprelegaj kursoj: pri kulturo (Ilona Koutny) kaj astrofiziko (Amri Wandel), kaj du prelegoj: pri astronomio (Karlo Spinola) kaj vitaminoj (Ite Tytgat). Fine de la tria kaj lasta leciono en la SUS-kurso pri astrofiziko okazis kiel kutime ekzameneto kiun partoprenis 25 personoj. Ĉiuj partoprenantoj ricevos AIS-atestilojn, kaj tiuj, kiu ricevis la plej altajn notojn, estos aldone premiitaj. **Amri Wandel**



Ilona Koutny fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



Amri Wandel fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

## HODIAŬA PROGRAMO

| | **Vendredo, la 11-a de julio** |
|---|---|
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **10.00 – 11.00** | Prelego de prof. Ilona Koutny: “Universitata instruado de Esperanto” (*Senata salono*) |
| **10.00 – 11.00** | Prezento pri la Premio Maertens. Kontribuas Mark Fettes, Michela Lipari, István Ertl (*aŭditorio 401*) |
| **11.00 – 12.00** | Invito al interlingvistiko. Gvidas prof. Mark Fettes (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Manfred Westermayer: “Milito kaj klimato kun ekologio” (*aŭditorio 403*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Aida Čižikaitė: “Famaj nomoj de la litova kulturo” (*aŭditorio 403*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de prof. Laura Brazzabeni: “Disvastigo de Esperanto per radio” (*aŭditorio 306*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Ulrich Matthias: “Esperanto en Afriko” (*aŭditorio 404*) |
| **15.00 – 16.00** | Prelego de Manfred Westermayer: “Marĉoj” (*aŭditorio 401*) |
| **15.00 – 16.00** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Neforgeseblaj momentoj de la UK-2024* (*aŭditorio 403*) |
| **16.30 – 17.30** | Prelego de Ite Tytgat: “Vitaminoj – esencaj eroj en nia nutrado” (*aŭditorio 403*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo “Komprenu min!” kun Mikaelo Lineckij (*aŭditorio 306*) |
| **19.00 – 21.00** | Prezentaĵo de Mario Migliucci kaj Kjara (*Granda salono*) |

## RAPORTOJ


fotis **Andrzej Sochacki**

Posttagmeza promeno malgraŭ la risko, ke pluvos...


fotis **Aleksej Salomatov**

Ĵomart kaj Nataŝa vekis entuziasmon ĉe la publiko.

# Kvaropo ekskursis al Veisiejai

Kvar partoprenantoj organizis merkredon propran ekskurson al loko nepre vizitinda por esperantistoj. Paulo Meliz, Gražina Opulskienė, Tim Owen kaj Franciska Toubale luprenis aŭton por veturi al Veisiejai, kie dum kvar monatoj en 1885 loĝis Ludoviko Zamenhof, tie li finpoluris sian projekton de la Unua libro. La ekskursantoj vidis memorŝtonon, kie troviĝis la lagborda domo de Zamenhof, etan prezenton en muzeo, kaj grandan monumenton en parko. **Tim Owen**


fotis **Tim Owen**

## INVITOJ




# La unua UK en Afriko sur la granda ekrano

Pasintjare por la una fojo en la historio Universala Kongreso de Esperanto okazis en Afriko: en la tanzania Aruŝo. Aleksej Salomatov pretigis dokumentan filmon pri la aranĝo. Se vi partoprenis la kongreson, venu por veki viajn rememorojn pri la aranĝo, se ne – informiĝu pri tio, kiel ĝi okazis. Ĝuu la etoson de la unua UK en Afriko!
**La dokumenta filmo de Aleksej Salomatov *Neforgeseblaj momentoj de la UK-2024 en Aruŝo, Tanzanio* (60 minutoj) estos prezentita hodiaŭ je 15.00 en aŭditorio 403.**
Morgaŭ okazos la lasta filmoprezento de Aleksej Salomotov: *Lastaj respektoj* (39 minutoj, kun subtekstoj en Esperanto).

# Prelegserio de Mark Fettes rete konsultebla

La plena teksto de la tri prelegoj de Mark Fettes en la serio "Lingvo kaj mondo" estas elŝutebla ĉe jena adreso:
https://www.researchgate.net/publication/393554289_Lingvo_kaj_mondo

**Mark Fettes**


Mark Fettes fotis **Gražvydas Jurgelevičius**

## PROGRAMŜANĜOJ

· La filmoj de **Aleksej Salomatov** estos prezentitaj hodiaŭ je 15.00 (*Neforgeseblaj momentoj de la UK-2024*) kaj morgaŭ je 12.00 (*Lastaj respektoj*). Ambaŭ en aŭditorio 403.
· La prelego de **Aida Čižikaitė** "Litovio dum jarcentoj" okazos morgaŭ je 12.00 en la Senata salono.

## INFORMOJ

# Historio antaŭ via nazo – ne pretergapu!


Apud la ĉi-jara BET-ejo troviĝas la hotelo Metropolis, en kiu ankaŭ loĝas pluraj el la BET-anoj. En ĉi tiu konstruaĵo estis fondita Kaŭna E-Societo. Apud la komuna manĝejo (Bistronomė) vidu la Kaŭnan Oficiran Hejmon, en kiu estis akceptita la decido uzi anstataŭ la rusa lingvo – Esperanton! Pli detale legu en la *Libro por BET-ano*, p. 48 kaj 52.

**Vytautas Šilas**

# IKU-libro en la libroservo

Speciale por SUS/BET aperis du novaj libroj. La IKU-libro, kiu enhavas la tekstojn de la SUS-prelegoj, samkiel de la 17 prelegoj de la Internacia Kongresa Universitato okazontaj dum la UK en Brno, kun rekorda paĝnombro de 330. Aldone aperis la libro *Astronomio kaj astrofiziko por ĉiuj* de Wandel kaj Spinola, kun la tekstoj kaj koloraj ilustraĵoj de la du samtemaj prelegoj okazintaj dum SUS/BET. Ambaŭ estas haveblaj en la libroservo.

**Amri Wandel**




## MORGAŬA PROGRAMO

| | |
|---|---|
| | **Sabato, la 12-a de julio** |
| **09.00 – 10.30** | Matenmanĝo (memstare) |
| **11.00 – 12.00** | Poezia anguleto: *La sonetoj de Orfeo* de Rainer Maria Rilke. Prezentas prof. Mark Fettes (*Senata salono*) |
| **11.00 – 12.00** | Prelego de Kristin Tytgat: "Diversaj aspektoj de interkultura komunikado" (*aŭditorio 401*) |
| **11.00 – 13.00** | Ĉiunivelaj Esperanto-kursoj (*aŭditorioj: A1/A2 – 306, B1 – 406, B2 – 404, C1 – 405, paroliga – 212*) |
| **12.00 – 13.00** | Baza kurso de la litova lingvo. Gvidas Severija Marija Banaitytė (*aŭditorio 401*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Aida Čižikaitė: "Litovio dum jarcentoj" (*Senata salono*) |
| **12.00 – 13.00** | Prelego de Nina Pietuchowska: "Homoj skribas kartetojn, poŝtkartojn, bildkartojn" (*aŭditorio 101*) |
| **12.00 – 13.00** | Filmo de Aleksej Salomatov: *Lastaj respektoj* (*aŭditorio 403*) |
| **13.00 – 14.30** | Komuna organizita tagmanĝo |
| **15.00 – 16.00** | **Solena fermo de BET-59** (*Senata salono*) |
| **16.30 – 17.30** | Kantas Valdas Striužas (*Senata salono*) |
| **17.30 – 19.00** | Vespermanĝo (memstare) |
| **18.30 – 19.00** | Lingva ludo "Komprenu min!" kun Mikaelo Lineckij – granda finalo (*aŭditorio 306*) |
| **19.00 – 21.00** | Adiaŭa vespero (*Senata salono*) |

## INFORMOJ

# Kontribuu al la adiaŭa vespero – anoncu vin!

Daŭre estas serĉataj kontribuaĵoj por la adiaŭa vespero, kiu okazos morgaŭ je 19.00. Ĉu vi pretas prezenti vian talenton: kanti, danci, deklami poemon, ludi instrumenton, prezenti skeĉon aŭ alimaniere montri vian kreemon? Ne hezitu kontakti min ankaŭ se vi havas demandojn. Ni kune sukcesigu ĉi tiun lastan komunan vesperon!

**Mikaelo Lineckij**

# FOTOJ DE LA TAGO

fotis **Gražvydas Jurgelevičius**



En la Esperanto-kurso de Vida Kulikauskienė.



Birutė Prekevičiūtė en la spektaklo *Litovio de Barbora*.



Arno Lagrange prelegas pri Stefan Zweig.



Laura Brazzabeni prelegas pri lingvoinstruado.



Severija Marija Banaitytė instruas la litovan.



Mario Migliucci en *Doktoro Esperanto*.


## FINANCA SUBTENANTO DE BET-59

iniciatyvos KAUNUI



**KUNFLUO** estas ĉiutaga informilo de BET-59. Redaktoro: Paweł Fischer-Kotowski, ✉ **kunfluo@proton.me**
Kontaktu la redakcion ankaŭ per SMS aŭ unu el la poŝtelefonaj aplikaĵoj: WhatsApp, Telegram aŭ Signal:

**+31 6 19 46 48 37** aŭ **@kunfluo**

en Signal: @kunfluo.2025